3. - rekomendas ankaŭ la I.L.E.I. kaj T.E.J.O. konsideri la proponojn de la Internacia Pedagogia Semajno, kiam tiuj proponoj koncernas la du organizaĵojn.

*La Dua Sekcio « Kontribuo de Esperanto al la granda projekto de UNESKO Oriento-Okcidento »* konstatas, ke la ĝis nun realigita interŝanĝo de esperantistaj prelegantoj inter Oriento kaj Okcidento estis fruktodona por la interkompreniĝo de la popoloj; ke esperantistaj grupoj en pluraj urboj organizas prelegojn kaj ekspoziciojn, kiuj favoras amikecon al Afriko kaj Azio kaj evoluigas utilan kulturen agadon; sekve rekomendas:

1. - ke en kiel eble plej multaj lokoj la esperantistaj grupoj, kunlabore kun aliaj interesitoj, ankaŭ neesperantistoj, inkluzive la Naciajn UNESKO-Komisionojn kaj la Ambasadojn, fondu en okcidentaj landoj societojn de amikoj de Azio kaj Afriko, kaj sur tiuj kontinentoj societojn de amikojn de Okcidento;

2. - ke tiuj societoj interŝanĝu prelegojn, sonbendojn, lumbildojn, filmojn kaj ekspozician materialon, kaj eventuale organiziĝu en Federacion, kiu povus plenumi gravan kulturen laboron pere de Esperanto;

3. - ke la lokaj grupoj kaj landaj asocioj esploru la eblecon kaj faru konkretajn proponojn pri interŝanĝo de personoj inter orientaj kaj okcidentaj landoj, — de kursgvidantoj kaj aliaj personoj — kies ĉeesto en la grupo kaj lando antaŭenigos la kulturajn interŝanĝojn inter Oriento kaj Okcidento kaj tiel servos al la celoj de la Esperanto Movado.

### COMUNICATO DELLA F.E.I.

#### Riunione del Consiglio Direttivo

Il Consiglio Direttivo della FEI si è riunito a Torino il 13-11-60. L'avv. Barbiellini ha commemorato il prof. Canuto, che da molti anni era presidente della FEI, e il Signor Meazzi, che da lungo tempo era membro del Consiglio. In loro sostituzione sono stati nominati membri del Consiglio l'ing. Mario Muretti di Torino e il sig. Felice Bertolotti di Milano. Si è proceduto poi all'assegnazione delle cariche sociali: alla presidenza e alla vi-

cepresidenza sono stati chiamati rispettivamente l'avv. Barbiellini e il dott. Canavero; l'ing. Aprosio e il sig. Dogliani conservano gli incarichi precedenti di segretario e di amministratore.

Riguardo alla sede e al funzionamento della segreteria non sono previsti, per ora, cambiamenti. Le Autorità Universitarie Torinesi hanno confermato che la FEI potrà continuare ad usufruire dei locali che il prof. Canuto era riuscito ad ottenere per la FEI, nell'Istituto di Medicina Legale da lui diretto.



# 46-a Universala Kongreso de Esperanto

HARROGATE (BRITUJO)

5-12 Aŭgusto 1961



HARROGATE: 5-12 VIII-1961  
46a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

- BAZA ARTIKOLO.** - Baza artikolo pri la kongresa urbo kun enciklopediaj notoj pri Britujo estas senpage havebla, por informvesperoj ĉe lokaj societoj, *rekte* de la Kongresa Oficejo.
- SONBENDO.** - Lokaj Esperanto-Societoj, regule aliĝintaj al Landaj Asocioj, povas senpage ricevi de la Kongresa Oficejo 30-minutan sonbendon por grupaj vesperoj. La sonbendo enhavas intervuon kun la Prezidanto de L.K.K., paroladon de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., alvokon de esperantista infano kaj muzikan programon.
- FAKAJ KUNVENOJ.** - Fakaj Asocioj, dezirantaj okazigi fakajn kunvenojn dum la Universala Kongreso, estas petataj informi pri tio la Kongresan Komitaton ĝis la 31-a de decembro 1960.
- SENPAĜAJ PARTOPRENOJ.** - Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.
- T.E.J.O.-KONGRESO.** - La Estraro de T.E.J.O informas, ke *kontraŭe al la antaŭa anonco*, la 17-a TEJO-Kongreso okazos en Wokingham (Britujo) de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto 1961.
- ANTAŬKONGRESO.** - Samtempe kun la Seminario « Oriento-Okcidento », okazos en Londono, de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961, la oficiala Antaŭkongreso, sub aŭspicioj de U.E.A. kaj de la Londona Klubo.

G. C. FIGHIERA

*Konstanta Kongresa Sekretario*

		ĝis 31-12-1960	ĝis 31-3-1961	post 31-3-1961
KONGRES - KOTIZOJ				
Kongresano	L.	6.565	7.570	8.575
Edz(in)o de Kongresano	L.	3.285	3.785	4.290
Junul(in)o ne pli ol 20-jaraj kaj studentoj	L.	2.190	2.540	2.890
<i>Por individuaj membroj de U.E.A.:</i>				
Kongresano	L.	5.865	6.850	7.875
Edz(in)o de kongresano	L.	2.935	3.425	3.940

**ATENTU, GESAMIDEANOJ!**

Petu aliĝilojn al *Itala Esperanto-Federacio - Corso G. Galilei, 22 - TORINO*.  
Aliĝante al la kongreso antaŭ la fino de la jaro, vi ĝuos rabaton, kaj donos moralan kaj realan helpon al via universala manifestacio!

# Tre malmulte oficiala raporto pri la XXXI Itala Kongreso de Esperanto

Post la forpaso de nia kara Prof. Canuto, ni pripensis ĉu estus oportune formeti tiun ĉi ĉercan artikolon; tamen ni konkludis, ke paroli pri Li kiel se Li estus ankoraŭ vivanta estas ankoraŭ maniero revivigi Lin: do, tio estas ankoraŭ omaĝo al Li.

Ni petas nian legantaron legi tiujn paĝojn kun tia spirito.

*Cortina akceptis la gekongresanojn kore, varme preskaŭ ame. Neniu sentis sin fremda, ĉiu sentis sin kiel en propra familio kaj ĉiu vivis la esperantistan etoson, kiel tiu samideano kiu, post dek minutoj da grimpaĉo sur la montoj, ekspiris: "Ho mia kor", ne batu maltrankvile - el mia brusto nun ne saltu for", aŭ tiu kiu antaŭ glasego da biero deklamis: "Eĉ guto malgranda, konstante frapante...". Eĉ en la aŝiĝo de la urbestro, esperante skribita, la gesamideanoj povis konstati la koran sintenon de Cortina al la gastoj. Bedaŭre ne mankis kelkaj eraretoj kiuj kelkfoje povis kaŭzi konfuzon, estigi embarason kaj perplekxon. Malfacile, ekzemple, estis koni la veran intencon de la urbestro kiam li "Bovenigis" la partoprenantojn. Ĉu oni devas kompreni "bonvenigi" aŭ boviniĝi? Oni devus pli multe zorgi en la estonteco la skribaĵojn por eviti miskomprenojn.*

Tamen tiu makulo estis tute forgesita, kiam en la salono de la urbodomo oni malfermis oficiale la kongreson. P.ro Agostini legis salutleterojn kaj telegramojn alvenintajn el deputitoj, aŭtoritatuloj, k.t.p. Menciinde estas ke ne sendis saluton la Prezidanto de la Respubliko, kaj eĉ la sekretario de O.N.U. ne sendis bondeziran telegramon. Poste sekvis la salutoj de la reprezentantoj de eksterlando, interalie bulgaro kiu eble estis forgesanta ke la kongreso daŭros nur ses tagojn kaj ke malfacile, do, daŭrigante paroli tiel longe, li povos fini ĝustatempe la salute-

*gon. La ĉeestantoj jam komencis murmuri "sed tio estas neĉesejo" kiam la afabla bulgaro donacis al P.ro Canuto belan magnetofonon por eviti al li la laboron ĉiam prepari novajn kongresparoladojn. La ĝentila donacinto asertis ke sufiĉas ke nia prezidanto gravurigu unu paroladon kiu estos disaŭdigata ankaŭ en la postaj kongresoj. Nur la variantoj povos tiamaniere okazi voĉe kun granda ŝparo da tempo.*

La brila parolado de P.ro Canuto, kiel kutime, vekis multan intereson kaj ricevis multajn aplaŭdojn. Interalie li substrekis ke Esperanto, kvankam tre facila, devas tamen esti studata por esti komprenata: "Ĉiuj esperantistoj" li diris "estas personoj kiuj faris sian kurson". Sed bedaŭre ankaŭ ĉi tie okazis miskompreno ĉar duono de la ĉeestantoj komprenis "faris sian kurson" kaj el tio konkludis ke la esperantistoj ne plu havas kurson, do estas senvaloraj kaj malaktualaj.

Menciante la progresojn de Esperanto ekde la unuaj jaroj post la apero de la unua gramatiko, la parolanto memoris, ke komence ekzistis nur unu gazeto: "La Esperantisto", tre malgranda, malregule aperanta kaj malmulte disvastigita. Kaj li aldonis ke poste komencis fondiĝi grupoj tie kaj tie kaj iom post iom la movado kreskis. Nuntempe, male, nia gazeto estas — ĉiuj ja scias — tre dika, bone disvastigita kaj regule aperanta kaj la kluboj ne nur estas fonditaj, sed krome ili disfalas kaj malaperas unu post la alia.

Dum la unua kunsido de F.E.I. oni parolis pri multaj temoj sed la plej interesa estis la studplano por la prezento en Parlamento de leĝa projekto por la fondiĝo en Bologna de Instituto de Esperanto, financita de la Stato. P.ro Canuto kaj ing. Azzi promesis sian efikan helpon, konfesante amiĝecon kun diversaj ministroj kaj deputitoj. Ankaŭ Samideano el

Romo, kiu estas amiko de parlamenta flegisto kuracanta la vundojn de la deputitoj post iliaj boksoj, anoncis sian helpon al la afero.

Oni aŭdis en lerta prelego de ing. Azzi ke la Esperanta literaturo estas tre konata kaj la libroj bonege disvendigas, kiel ekz. "Retoriko", kies ekzempleroj restas nevenditaj de monatoj en la ŝrankoj de la Milana klubo, aŭ kiel tiu "tre konata traduko de tiu fama pola ĉefverko"... kies titolo eĉ la oratoro forgesis.

Tamen tiu libro estas, li rediris, tre konata (aŭ konita? Tiu eterna problemo de la participoj!).

Ni ankaŭ aŭdis raporton de S.ro Pennazio pri la de li estrata Informa Oficejo.

Li parolis pri la bulteno "Notiziario Internazionale" kaj pri la interesiĝo de ĝi vekita. Interalie li asertis, ke fama ĵurnalisto kiu ŝanĝis adreson insistis por ke "Notiziario" estu al li daŭre sendata en la nova domo. Alie, kiel plenigi la paperkeston, bruligi la fajron, enpakigi, k.t.p.? Bedaŭre nia valora Pennazio anoncis ke li ne plu povos daŭrigi sian laboron. Fakte la edzino fine komprenis kio signifas "In-forma oficejo". Ni gratulas nian samideanon pro la granda laboro farita en tiu kampo de informado kaj esperas ke nova kunlaboranto, konscia pri la graveco de la posteno, baldaŭ aperos.

Inter la proponoj faritaj dum la kunsidoj, la plej interesa estis (ĉu malfacile diveni?) de Ermigi Rodari kiu proponis, ke la estontaj fremdaj salutantinoj dum la kongresa malfermo estu nur junaj kaj belaj. Oni unuanime akceptis la proponon iom ŝanĝitan tiele: ke, ne fiksanite limon de beleco, estas decidite ke la salutantinoj ne estu pli aĝaj ol 25 kaj iliaj mezuroj ne superu 100 - 60 - 100. Alia propono venis de nekonatulo, kiu petis ke la orientanoj ne salutu pli ol 10 sekundojn, la tempo necesa al la monda ĉampiono kuri 100 metrojn kaj al la ĉestintoj forflugi el la salono.

En la kadro de la Kongreso okazis ankaŭ Arta Konkurso, kiun partoprenis multaj kleruloj kaj sentoplenaj artistoj. Ankaŭ Vittorio Dall'Acqua partoprenis en la Poezia branĉo kaj li gajnis la duan

premion. Sed tio estis facile antaŭvidebla ne nur pro la konata poeziamo de nia juna talentulo, sed ankaŭ ĉar la konkurantoj estis nur du. Verdire, estis ankaŭ tria poeto, sed lia poemo ne estis atentita de la ĵugantaro, ĉar ne traktis fidele la temon, t.e. ne parolis pri la naturaj belecoj de la Cortina Valo. Ni, pro justeco, konigas al vi kelkajn versojn el tiu poemo, por ke vi mem povu juĝi. La titolo estas "Mallongeta de Longtempe", fidela esperanta traduko de la kongresurbo, laŭ la sugesto de S.ro Tanzi.

Forte ni staru fratoj amataj kun glaso de hela biero!

Ni dancegadu kune tenataj por unu bela espero!

Vidas ĉirkaŭe ni stultan amason, la mondo dormas abstine.

Sed jam ni levos baldaŭ la glason por trinki, drinki senfine.

Nur la bierfabrikantoj komprenis la valoron de tiuj versoj kaj sendis ilian aŭtoron al Munkeno tute senpage por tie-altiri novajn impresojn.

Kaj pri la amuzaj aferoj? Ili estas ne preterlaseblaj en itala kongreso de Esperanto.

Estas grava ero de nia jara manifestacio, aŭ — pli bone — sinsekvo da eroj, do eraro, kiu vivigas kaj riĉigas la programon. Dancoj — krom la kongresa ballo — okazis ĉiŭespere kaj la salono de la nokta klubo, kie la gesamideanoj kutime kunvenis, estis tiel plenplena ke la gedancantoj estis devigitaj danci tre proksimaj, tiel ke — kiel siatempe diris Schwarz — kelkfoje oni ne komprenis ĉu iu danco estis fokstroto aŭ rokstroto. Interalie ni vidis kiel laŭlitere niaj junaj gesamideanoj komprenis la devizon de U.E.A. pri la interŝanĝo de kulturaj valoroj inter Oriento kaj Okcidento. Sed ĉi foje, eble pro la manko de georientanoj, la interŝanĝo okazis inter Sudo kaj Nordo. La rezultoj de tia rimarkebla alproksimiĝo ni esperas estas publikigitaj de la ĵus fondita eldona fakto de F.E.I. en libro ege konsilinda al ĉiuj ĝis la naŭdeka jaro, sed severe malpermesota al pli junaj ol 16.

Tiam ni vidos ĉu ankaŭ ĉijare Esperanto fariĝis por iuj fraŭlinoj Edzperanto.

Dum la kongresa balo, krom la premiaĉdo de la artistoj, estis tento okazigi elekĉton de "Miss". Sed tiu iniciato fiaskis, ĉar evidente — kvankam multaj fraŭlinoj havis ŝancojn — neniu deziris esti elektita "Miss", ĉar nomi "Miss" fraŭlinoŝn povas esti konfuŝon kun la misfraŭlinoj.

Kelkaj vortoj pri la geĉantistoj el Ljubljana. Tre harmonia ĥoro, bone preparita. Mirinda kaj instrua estas aŝskulti ĝin, ĉar ĝi portas al ni popolaĝn kantojn de fremdaj landoj kiujn ni, sen Esperanto neniam estus konintaj. Fakte, oni ankaŭ disaŝddigis al ni italan kanton kiu 90% de la aŝskultantoj neniam antaŭe aŝdis. Jen la valoro de Esperanto por la pliriĉigo de nia kulturo!

P-ro Canuto multe laŭdis kaj gratulis la ĵunajn geĉantistojn kaj instigis la italojn seĉvi ilian eĝzemplon. Seĉve de tiu instigo ŝajnas, ke en Milano estas bonaj intencoj. Fakte la estroj de la Milana ĵunulara seĉcio proponis al la prezidanto de C.E.M. S-ro Bertoletti: "Donu al ni tielajn fraŭlinojn kiel tiuj ĵugoslavinoj, kaj vi vidos kian ĉoron!" (ili sisteme rifuzas uzi la "ĥo" de la esperanta alfabeto, laŭ ili arĉaika, kaj sisteme elparolas "ĉo" anstataŭ "ĥo". Sed, ĉikaze, kian signifon havas la vorto?).

Multan intereson ankaŭ vekis Hoĉey-

ludado en la bela olimpia stadiono. Precipe la lingvistoj estis kaptitaj de la ludo, tute strebintaj eltrovi taŭgajn esprimojn por montri ilian sintenon al la arbitranĉto.

Plej ĉomunaj la vortoj "Blindulo, murdisto, ĉornulo, malbonvirinido", kaj aliaj cenŝuritaj.

Sume brila kongreso, bone organizita de P-ro Agostini kaj de iliaj ĉarmaj kunlaborantinoj. Brila kongreso, mirindaj loĉoj, sed precipe neforgeseblaj kongresaninoj, kiuj, pro la mirakla floro de amikĉo kiu kreskas nur en la ĝardenoj de nia kongresurbo, renovigis la ĉutimon saluti la forirantojn per ĉisoj kaj ĉirĉaŭprenoj. Nur Ermigi rifuzis esti ĉirĉaŭprenita por eviti esti mokita. Fakte laŭ li "ĉirĉaŭpreni" signifas itale "prendere in giro".

Ni ne miru do se la forveturo estis iom melankolia kaj se kelkaj kongresanoj, al la ĉisoj kaj ĉirĉaŭprenoj, aldonis kun larmantaj oĉuloj ĝisrevidan kantan saluton al la bela kongresurbo:

Cortina, Cortina, Cortina,  
mi volus reveni ĉe vi.  
Ho Cortina ĉara, ho belaĉo rara,  
mi ne povos vin forgesi,  
ho ne, ne, ne, ne, ne.

LA REPORTERO

N. B. - La nomoj de la loĉoj, personoj kaj faktoj en tiu ĉi raporto estas realaj kaj faritaj laŭintence.

## Deziras korespondi kun italoj

el POLUJO (Polonia)

— Wladyslaw Bortiewicz - Poligon 90 m. 10 - WARSZAWA 72. - (serĉas filateliston).

— Kazimierz Zurawski - ul. Ostroleska 1 - PRZEMYSL. (19j. pri muziko, filmoj, sporto, interŝanĝo p. m., p. k., disĉoj).

— Wiktor Kryczkowski - Av. Czerwoney 62 - WLOCLAWEK. (dez. ĉoresp. kaj interŝanĝ.).

— Nina Klodas - Orla 40 - PABIANICE (instruistino dez. ĉorespondi).

el USONO (U.S.A.)

— Leonard A. De Angelis - 116 Stimson St. - WEST ROXBURY, Mass. (19j. studento en kolegio de instruistoj).

el ĉEKOSLOVAKUJO (Cecoslovacchia)

— Emil Sedlacek - n. Hranicaru 10 - TRUTNOV. (dez. ĉor. pri ĉio).

el BULGARUJO (Bulgaria)

— Rosica Ieneva Preeva - str. Fridrik Engels 18 - KAZANLAK. (dez. ĉoresp. kaj interŝ. p.m. kaj p.k.).

— Peter Todorov - str. Szedna gora 88 - SOFIA 3. (19j., ĉor. kaj interŝanĝ.).

— Georgi Kostov - str. Vazil Zazkov 19 - VRACA. (19j. ĉor. kaj interŝanĝ.).

# NIA KONGRESVOJAĜO

Kvardeko da socianoj el 12 urboj, partoprenis la aŭtobusan vojaĝon organizitan de nia Federacio okaze de la 45-a U.K. en Bruselo. Favorpreza arango por tendumantoj ebligis al multaj gejunuloj ĉe esti unufoje Universalan Esperanto-Kongreson kaj ĝui ĝian unikan internacian atmosferon.

Je la fino de la kongreso, nia grupo dividiĝis kaj, dum parto de ĝi atingis Parizon, 24 personoj ekskursis al Londono. La interesa restado en la brita ĉefurbo estis alloga instigilo al plua vizito de Anglujo kaj taŭga okazo estos partopreni la 46-an U.K. en Harrogate venontjare!

Post la vizito de Parizo, nia tuta grupo forveturis al Lyon kaj de tie ĝi revenis al Torino.

Kiel kutime, nia vojaĝo estas organizita kunlabore kun la delegitoj de U.E.A. en ĉiuj urboj kie ni haltis. Estas aparte menciindaj la afablaj akceptoj, kiujn ni rice-



*Nia vojaĝgrupo dum la vizito al Kastelo de Versailles.*

vis, fare de la lokaj Esperanto-Grupoj, en Dijon kaj Lyon, kie kvar tagjurnaloj raportis pri nia restado per intervjuo kaj fotoj.

*Per gli esperantisti cattolici*

## «CITTÀ NUOVA» in esperanto

«Città Nuova», periodico quindicinale del «Movimento dei Focolari dell'Unità» diretto da Iginò Giordani, ad una proposta di una amica bolognese circa l'opportunità di pubblicare una edizione in esperanto, risponde così:

«Non abbiamo nulla in contrario a che *Città Nuova* sia tradotta in esperanto. Occuparsene direttamente la nostra direzione, per ora, non è possibile, giacchè deve già curare le edizioni del giornale in italiano, tedesco, francese, inglese, spagnolo, portoghese e fiammingo. Ma se qualcuno dei nostri lettori vuol prendere su di sè questa iniziativa, noi siamo ben lieti di aiutarlo in tutto quello che potrà essere utile».

Questa risposta è apparsa sul n. 17 del 15 settembre 1960 di «Città Nuova». Chi potesse aiutare la bella rivista romana a realizzare l'edizione in esperanto, o chi semplicemente fosse interessato a conoscere il Movimento dei Focolari dell'Unità, è pregato di prendere contatto con *Città Nuova*, via della Scrofa 14/10 - Roma.

## GLUMARKOJ DEL 46° CONGRESSO UNIVERSALE DI ESPERANTO di Harrogate (Inghilterra)

sono disponibili presso la F.E.I.

Ogni foglio di 25 *glumarkoj*, a 4 colori, costa L. 155, porto compreso.

### «FLOROJ KAJ BIRDOJ»

8 plurkoloraj il. pk. deŝireblaj, en broŝuro, kun bildkovrilo. Eldonas «El Popola Cinio».

Ciu serio de 8 il. pk. kostas lirojn 100, plus 15 liroj por sendkostoj.

12 BELEGAJ FOTO-AFISOJ  
pri la HOMAJ RAJTOJ  
kun Esperanto-teksto.

Eldonis UNESKO. Prezo: 600 liroj, kiuj inkluzivas registritan sendon.

Mendu ĉe Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22. TORINO. Poŝtĉekkonto 2/37768.



# NOVA SENTO



rubriko  
de la *gejunuloj*

## SKIFERIO EN SVISLANDO

*Esperanto-Junularo de Svislando organizas sian ĉiujaran skiferion en Adelboden (Bernaj Alpoj). La restado estas propra, bela ĉaledo en la ĥoro de fame konata ŝkiparadizo; riĉa programo garantias la sukceson de la kunveno.*

*La skiferio okazos de la 24-a de decembro ĝis la 2-a de januaro 1961 kaj la partoprenantoj nepre devas esti esperantistoj.*

*Por pliaj informoj vin turnu al: Esperanto-Junularo de Svislando, LA SAGNE (Neuchâtel) IV, 6291.*

## ĈIAM MINNAJA EN LA ORATORA KONKURSO

Ankaŭ ĉi tiun jaron inter la premiitoj de la Oratora Konkursuro ni trovas iu tre konata familia nomo: MINNAJA! Ja, la unua premio, kiu enhavas la arĝentan pokalon « Premio Ivo Lapenna », estis aljuĝita al la juna Carlo Minnaja, dume la trian premion ricevis Nicola Minnaja. La temoj pritraktitaj de la du fratoj estis, respektive: « Internaciismo, Naciismo kaj Patriotismo » kaj « Sporto — Ĉu rimedo de internacia amikiĝo? ».

Dum ni gratulas tutkore kun niaj samideanoj Minnaja pro la brila sukceso, ni substrekas la fakton, ke ili ambaŭ estas denaskaj esperantistoj: en la plej efika maniero ili daŭre fruktigas la lingvistikajn gepatrajn instruojn!

## ZAMENHOFA RENKONTIĜO EN LOSTWITHIEL

*Ankaŭ ĉi-jare la Junularo Esperantista Brita organizas Zamenhofan Renkontiĝon okaze de Kristnasko.*

*La kunveno, kies programo inkluzivas ekŝkursojn, prelegojn k.t.p., okazos en Lostwithiel, ĉarma urbeto situata en sudokcidenta Anglujo, inter la urboj St. Austell kaj Bodmin.*

*Por pli detalaj informoj turniĝu al: H. R. Tonkin, St. John's College, CAMBRIDGE (Anglujo).*

## GEJUNULOJ KORESPONDADU

- Sophie Krystek - ul. 1go Maja 26 m. 2 - TUREK (studentino serĉas studentojn).
- Longin Szymanski - ul. Nowa 2 - PLOCK (gimn. studento dez. ĥor. kun knabinoj).
- Tadeusz Szczepanek - ul. Sienkiewicza 27/3 - KATOWICE I. (26j. ĥor. kun gejunuloj).

## SKIFERIO EN FILZMOOS

*Sesa Skiferio kaj kvara Ŝkikonkursuro de TEJO okazos de la 26-a de decembro 1960 ĝis la 8-a de januaro 1961, en Filzmoos (Austrio).*

*Filzmoos estas bela kaj konata ŝkivilaĝo kun multaj skilistoj kaj ekskurseblecoj. Detalajn informojn petu al: Heinrich Reiter, Altmannsdorferstr. 90/1 - WIEN XII (Austrio).*

# Rassegna della Stampa

STAMANI MASSA E BAD-KISSINGEN « GEMELLE ».

*Con questo titolo su nove colonne La Nazione (Firenze) del 20 aprile, apre un esauriente servizio di una pagina e mezza sull'avvenimento. Molte fotografie illustrano i diversi articoli che riportano, fra l'altro, dichiarazioni di consenso del sindaco di Massa, dott. A. Del Nero, del sen. G. Guidoni, del presidente dell'Azienda Autonoma di Marina di Massa dott. P. P. Piccinini e di altre personalità che sarebbe troppo lungo citare.*

*Anche nelle edizioni del 19 e del 21 aprile La Nazione annuncia e commenta l'eccezionale avvenimento con articoli in apertura di pagina su sei colonne.*

*Sullo stesso argomento Il Tirreno (Livorno) del 21-4 e Il Giornale del Mattino (Firenze) del 21-4, pubblicano ampi servizi di cronaca e di serio commento. Questo gemellaggio, e lo registriamo con vivo compiacimento, ha suscitato molto interesse e favorevoli commenti nella stampa italiana in generale e specificatamente nei quotidiani locali.*

L'ESPERANTO, LINGUA DELLA FRATELLANZA,  
HA DIVERSE MIGLIAIA DI CULTORI A MILANO.

*Sotto questo titolo Sergio Turone ci presenta su L'Informatore Moderno (Milano) del 10-4 (su sei colonne e con alcune fotografie) un servizio di cronaca, assolutamente obiettivo. Esso non richiederebbe particolare commento, ma poichè ci accade qualche volta di leggere sull'Esperanto affermazioni di giornalisti, evidentemente non di grande valore, che nulla sanno di questa lingua e neppure si prendono la pena di informarsi, registriamo con piacere il servizio dell'articolista milanese. Egli infatti, per stendere il suo pezzo, si è recato al Circolo Esperantista Milanese e ha rivolto un po' di domande in giro: il che appunto fa parte del suo mestiere.*

POSTARADIO RISPONDE SULL'ESPERANTO.

*Quasi un'intera pagina è dedicata all'Esperanto nel numero del 14 maggio del Radiocorriere (Torino). Si tratta di una lettera di Raffaele Morra di Fossano, che precisa e rettifica quanto di inesatto era contenuto in una risposta a un lettore che chiedeva indicazioni sull'Esperanto, in un numero precedente dello stesso settimanale. L'articolista, dopo aver riportato integralmente le informazioni del lettore fossanese, dichiara che la risposta precedente, che appunto ha provocato la lettera del sig. Morra, era lacunosa per ragioni di spazio.*

CONSEGNATA AL PROVVEDITORE AGLI STUDI  
LA MEDAGLIA D'ARGENTO ZAMENHOFIANA.

*Il Faro (Trapani) del 28 aprile, riporta con questo titolo a cinque colonne la cronaca della cerimonia nel corso della quale il dott. Giuseppe Purpi, Provveditore agli Studi di Trapani, è stato insignito dell'alta onorificenza esperantista. Come è noto, il dott. Purpi non soltanto è favorevole alla nostra lingua ma è pure a conoscenza dei programmi e dei problemi del nostro movimento. Alla manifestazione erano presenti, oltre a numerose personalità scolastiche, autorità civili e religiose.*

ACCOMUNATI IN TUTTO IL MONDO  
DALLA PASSIONE PER L'ESPERANTO.

*L'articolo che porta questo titolo su cinque colonne è apparso sulla Gazzetta del Popolo (Torino). Lo citiamo trattandosi dell'importante quotidiano torinese, che pubblica il pezzo, siglato p.l.p., con molto rilievo, in apertura di pagina. L'articolo, datato Vercelli 30 giugno, è una cronachetta leggera, anche se obiettiva, sulla vita del gruppo locale. Il cronista riporta fedelmente le informazioni assunte dagli esperantisti vercellesi, ma si avverte, tra le righe, una certa perplessità. Forse la complessità del problema linguistico lo spaventa ed egli se la cava concludendo*

bonariamente il suo pezzo, peraltro buono, con l'affermazione che gli esperantisti, nelle loro serate di riunione, discutono « in una strana lingua che sa di tedesco e di latino, davanti ad una tazza di caffè o di camomilla ». E poiché la camomilla viene menzionata anche in apertura del pezzo, si ha l'impressione che p.l.p. sia stato colpito, non si sa perchè, da questo blando infuso anzichè dalla grandiosità degli orizzonti che il nostro movimento apre all'umanità.

#### CRONACA ESPERANTISTA.

Sul Congresso Nazionale di Cortina d'Ampezzo, notizie e commenti sono apparsi in molti giornali italiani. Citiamo, fra quelli che hanno dedicato maggior spazio con articoli di rilievo, L'Arena (Verona), L'Adige (Trento), Il Piccolo (Trieste), Il Gazzettino (Venezia), il Giornale di Vicenza (Vicenza) e Alto Adige (Bolzano).

La rivista mensile Panorami ci informa, nel suo numero di luglio, che a Cervia (Ravenna) è stato recentemente inaugurato il primo albergo che porta il nome della lingua internazionale « Esperanto » e che ha per insegna la stella verde degli Esperantisti. Aggiunge la notizia che il personale di servizio viene scelto fra coloro che parlano anche l'Esperanto. Titolare dell'albergo è il signor Melandri.

Con un titolo a tre colonne il Corriere di Sicilia (Catania) del 12 agosto, dà notizia che sono state coniate dalla zecca statale olandese le monete internazionali. L'articolo, a carattere informativo, è serio e positivo.

#### L'ESPERANTO COME ELEMENTO

#### DELL'INTEGRAZIONE ECONOMICA EUROPEA E MONDIALE.

È il titolo di un interessante e sagace articolo del collega Francesco Borzani apparso sul Corriere della Valtellina (Sondrio) il 27 agosto. Con intelligenza e misura l'articola illustra il lavoro e gli scopi del Centro per l'Esperanto nel Commercio, nell'Industria e nel Turismo, sorto a Milano. La questione del rilancio esperantista nel quadro della Comunità Europea è il tema dell'articolo. Parlando delle difficoltà linguistiche che si presentano ai piccoli operatori economici, agli artigiani, ai professionisti, nei loro rapporti con l'estero, Borzani suggerisce: « Diamo a queste categorie un mezzo facile e di accessibile strumentazione, diamo loro un Esperanto che è una lingua già affinata e collaudata in tutti i campi ».

Altrettanto interessante, per quanto consideri l'Esperanto da un punto di vista essenzialmente linguistico, è l'articolo a firma Giorgio Spina pubblicato su Il Lavoro nuovo (Genova) il 22 giugno. Con un titolo a tre colonne « Esperanto, sintesi linguistica », l'articolo rifà brevemente la storia della nostra lingua, ne illustra la funzione sociale e l'utilità, ne delinea schematicamente la struttura grammaticale.

Sei sono le agenzie di stampa che hanno diramato notizie sull'Esperanto: ANSA, Italmondo, EUROPA, Mondo, Die (Roma) e Stampa Internazionale (Torino).

Numerosi altri giornali, infine, pubblicano servizi di ampio rilievo sull'Esperanto e su manifestazioni esperantiste. Fra questi citiamo: L'Ordine (Como), Israel (Roma), Corriere di Mondovì, Eco delle Valli (Sondrio), La Prealpina (Varese), Messaggero Veneto (Udine), Il Filatelico (Catania), Il Duemilista (Palermo), Ingegneria Meccanica (Milano), Selva (Torino), Il Nuovo Rocciamelone (Torino), Corriere della Valtellina (Sondrio), La Sesia (Vercelli).

GINA FOR

---

#### PER UNA PIU' FORTE F.E.I.

Nell'elenco dei soci sostenitori 1960 della F.E.I., pubblicato sul n. 65 della nostra rivista, dev'essere anche compreso il nome della signorina Maura Mordacci, segretaria del Gruppo di Modena.

#### GRUPESTROJ!

Konigu, antaŭ la 1-a de decembro 1960, informojn pri nomo, adreso kaj kunvenhoroj de via Grupo por la listo en Jarlibro 1961!

Prezo: unu dekonon de jarkotizo M.A., tio estas liroj 270, sendotaj al la Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO. Poŝtĉekkonto 2/37768.



# VIVO DE LA GRUPOJ

ACIREALE. — Okazis la ekzamenoj je la fino de sukcesa kurso gvidata de prof. Bruno.

ALESSANDRIA. — Oni starigi Provincan Katedron de Esperanto, sub la direkto de prof. Adolfo Bronchi kaj kun la kunlaborado de prof-inoj Ombra Reale Moroni kaj Emma Sottotetti.

COMO. — Jara ĝenerala asembleo de la grupanoj okazis la 24-an de oktobro ĉe la sidejo. La tagordo enhavis moralan kaj financan raportojn, elekton de la nova estraro kaj diskuton pri la estonta programo.

Ekskurso al Bellinzona estis organizata de la loka grupo, okaze de Regiona Kunveno de Svisa Esperanto Asocio, la 16-an de oktobro. La prezidanto de la grupo, ing. Giordano Azzi, prelegis en la kadro de la sukcesa renkontiĝo.

En Cadorago baldaŭ naskiĝos nova Esperanto-grupo. Sekve de la kurso okazinta dum la pasinta studsezono, danke al la lerteco kaj sindonemo de instruistino Pinuccia Appiani, S-ro Amilcare Capelletti kaj S-ro Clerici, la tieaj novaj esperantistoj sekvas kun intereso la semajnajn kunvenojn.

MILANO. — La 3-a Internacia Ekspozicio de la Libro, organizita de la Asocio de Italaj Eldonistoj, kiu enhavas ankaŭ librojn en Esperanto, estis inaŭgurata la 23-an de oktobro en la Reĝa Palaco de Milano. La ekspozicio estis fermita la 31-an de oktobro.

Programo de vesperoj dediĉataj al « terminologiaj demandoj » komenciĝis la 28-an de oktobro. Partoprenas la interesajn « vesperojn » prof. Stefano La Colla, membro de Internacia Akademio de Esperanto.

MIRANDOLA. — En la ĝenerala asembleo okazinta la 10-an de junio, post la aprobo de la financa kaj morala raportoj, oni elektis jenan estraron: Roberto Veronesi (prez.), Giorgio Grilli (vicprez.),

Walter Luppi (sekr. kas.), Ortensio Manicardi (bibl.), D-ino Franca Soli, Maria Fangarezzi, Adele Lugli, Riccardo MorSELLI kaj Mario Amadei (gekoncil.).

Du kursoj, elementa kaj duagrada, komenciĝis la 20-an de septembro sub la gvidado de s-ro Roberto Veronesi. Triagrada kurso komenciĝos en januaro.

Esperanto-ekspozicio, pri kiu raportis favore diversaj gazetoj inter kiuj *Avvenire d'Italia* (Bologna), estis organizata, kun plena sukceso, de la loka grupo. La ekspozicio okazis de la 4-a ĝis la 11-a de septembro ĉe la « Galleria del Popolo ». Nombra publiko ĝin vizitis.

Oni prizorgis ĉe la sidejo riĉan bibliotekon, kiu estas je dispono de la membroj.

Ekskurso al Barcellona, okaze de la in-



ternacia kongreso de la esperantistaj fervojistoj, dum majo 1961, estos organizata de la loka grupo. La interesuloj sin turnu al la grupo de Mirandola.

La grupo, de la pasinta septembro, zorgas la eldonon de Informa Bulteno. La bulteno, akurate redaktata sur tri folioj, entenas, krom la informojn pri la vivo de la loka grupo, la plej interesajn novaĵojn pri la nacia kaj internacia movado.

PALERMO. — Finiĝis sukcese la kurso gvidata de Prof.ino Picciotto.

RAGUSA. — La Esperantista Delegacio de Sicilio partoprenis la ekspozicion de infanaj dezegnaĵoj organizita de la loka ENAL. La esperantistoj kontribuis al la manifestacio per dudek verkoj el Hiroŝima.

ROMA. — La «Unione Italiana dei Federalisti Mondiali» kaj la «Commissione Esperantista del comitato internazionale per l'unità e l'universalità della cultura» organizis la 13-an de oktobro sukcesan prelegon de la japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino. Temo de la prelego estis «La vivo en Japanujo, hodiaŭ kaj hieraŭ».

ROMAGNANO SESIA. — La nova Esperanto-grupo en tiu urbo pligrandiĝas. La adreso de la grupo estas: *Gruppo Esperantista Giovanile - Istituto Tecnico Commerciale "Curioni", Romagnano Sesia (Novara)*.

SCIACCA. — La 18-an de septembro la ĝenerala asembleo, sub la prezidanteco de la regiona delegito de F.E.I. por Sicilio, adv. Boscarino, unuanime decidis doni al la grupo la nomon de prof. Giuseppe Chiappisi, pioniro de Esperanto en okcidenta Sicilio, fondinto kaj kerno de la grupo kaj poste honora prezidanto.

La asembleo procedis kun la aprobo de la financa kaj morala raportoj kaj sekve elektis la novan estraron, kiu rezultis jene: prof. Franco Tulone (prez.), d-ro Francesco Antogna (vicprez.), d-ro Vincenzo Lupo (kasisto), Michele Di Giovanna (sekr.), d-ino Maria Cassar, d-ino Maria Rosa Cucchiara, Filippo Chiappisi (gekonsil.), d-ro Salvatore Ficani, d-ro Nicolò Lombardo kaj d-ro Primo Veneroso (reviz.).

La loka gazetaro kaj radio raportis pri la okazintaĵo.

TORINO. — En la kadro de la vesperaj kunvenoj de septembro okazis, la

21-an, «parolata gazeto» kaj filmprezentado la 28-an.

La loka Esperanto-Katedro estas denove malfermita por informoj kaj dokumentadoj pri la nacia kaj internacia movado. La sidejo, situata en Strato Po 13, funkcias ĉiumerkrede de la 17-a ĝis la 19-a.

Estas programita verko pri la historio de la Esperantista Movado en Torino de 1910 ĝis la nuna tempo. Informojn kaj dokumentojn (fotografaĵojn, leteiojn, k.t.p.) oni adresu al Esperanto-Katedro, strato Po 13, Torino.

Kun la aprobo de la Provinca Studestro de Torino, la 11-an de novembro komenciĝis la jarajn kursojn de Esperanto ĉe la Komerca Lernejo «Giulio».

TRAPANI. — La Esperanto-kurso gvidata de prof. Parisi finiĝis. Je la fino de la kurso regule okazis la ekzamenoj.

VERCELLI. — Ĉe la klasika liceo komenciĝis la 15-an de oktobro elementa kurso de Esperanto.

La loka grupo, kiel signo de dankemo pro la intereso plurfoje montrita de la televida prezentisto Enzo Tortora, kaj pro la propagando de li farita ĉe la radio kaj la televido, havigis al li karton de honora membro de la Verĉela Grupo. Enzo Tortora esprimis sian plezuron pro la atento kiun la verĉelaj esperantistoj turnis al li.

Post la somera interrompo, rekomenciĝis la vesperaj kunvenoj, kiuj laŭkute okazas mardon je la 21-a horo.

VICENZA. — La 8-an de oktobro ĉe la sidejo de la grupo oni disdonis la diplomojn al la lernantoj kiuj vizitis la elementan kurson, sub la gvidado de profino Carla Bortolan. S-ro Massimo Casoli estis premiata kaj ricevis la verkon «Taglibro de Anna Frank». Inter la lernantoj distingiĝis: Antonio Matteazzi, Luciana Taddeo, Guido Michele, Silvio Taddeo, Laura Nicoletti kaj Dionisio Piccolo. Disdonis la diplomojn d-ro Milos Ignjatovic el Novi Sad (Jugoslavujo), kiu estis ŝatata gasto. Li ankaŭ faris prelegon pri la temo «Esperanto kaj internacia turismo».

#### POR LA PROPAGANDO

« LE COURRIER » de decembro 1959, en franca lingvo, publikigis gravan artikolon pri Zamenhof.

« LE COURRIER » estas la granda kultura revuo de UNESCO. Ĉiu esperantisto devus havigi al si la diritan artikolon, kaj legigi ĝin al siaj amikoj neesperantistoj!

La kajero estas havebla ĉe Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO: prezo liroj 120 inkluzive sendkostojn. Poŝteĉkonto 2/37768.



#### NUNTEMPA BULGARIO

Samkiel por la jaroj 1959 kaj 1960, Itala Esperanto-Federacio akceptas abonkotozajn por la venonta jaro pri la interesa bulgara revuo.

Prezo: liroj 1.000, sendotaj al poŝteĉkonto 2/37768.

Oni ne forgesu, ke NUNTEMPA BULGARIO estas monata revuo, ke ĉiu 50-paĝa kajero estas ilustrita, ofte kolore kaj ĉiam kun kolora kovrilo.

#### EL POPOLA ĈINIO

la interesa ĉina revuo, ilustrita kun kolora kovrilo, ankaŭ por la jaro 1961 havos la nunajn prezon, enhavon kaj amplekson.

Sendu jarkotizon de liroj 420 al la Itala Esperanto-Federacio; Corso G. Galilei, 22, TORINO; poŝteĉkonto 2/37768.



#### BANDIERINE ESPERANTISTE

Richiedete alla F.E.I., Corso G. Galilei, 22, TORINO, le bandierine di stoffa, triangolari, per auto o biciclette, o per decorazione di ambiente, con stella verde a cinque punte su fondo bianco (dimensioni cm. 15 x 24). Prezzo L. 150 caduna, più L. 25 per spedizione ordinaria; e L. 85 per spedizione raccomandata; c/c postale 2/37768.



#### GLOSSARIO DEI CONGRESSI

Ogni esperantista dovrebbe procurarsi questo interessantissimo opuscolo, redatto in italiano, Esperanto, francese, inglese e tedesco.

Prezzo: ogni copia L. 150, comprese le spese di spedizione.

Inviare l'importo alla F.E.I., Corso G. Galilei, 22, TORINO. - Versamento sul c/c postale 2/37768.

## L'ECO DELLA STAMPA

Ufficio di ritagli da giornali e riviste

Fondato nel 1901

Direttore UMBERTO FRUGIELE

Via Compagnoni n. 28 - MILANO - Telefono 723.333

Casella postale 3549

Telegr. ECO STAMPA

C. C. I. A. Milano 77394

# LIBRI IN VENDITA PRESSO LA F.E.I.

Corso Galileo Galilei, 22 - TORINO - c/c postale 2/37768

<i>Grazzini</i> - Corso di Esperanto	L. 600	<i>UECI</i> - Manuale pratico della	
— Appendice alla grammatica	» 130	lingua Esperanto	» 335
— Dizionario italiano-Esperanto	» 600	— Manuale di conversazione	» 90
— Dizionario Esperanto-italiano	» 150	italiano-Esperanto	» 800
— La lingua di tutti	» 50	<i>Kalocsay</i> - Ezopa saĝo (rilegato)	» 200
<i>Migliorini</i> - Esperanta legolibro	» 400	<i>G. Mattos</i> - La Nigra Spartako	» 625
<i>A. Tellini</i> - Dizionario Esperanto		— Stupoj sen nomo	» 625
italiano rilegato	» 800	<i>R. Rossetti</i> - Pinta krajono	» 1200
<i>Privat</i> - Vivo de Zamenhof	» 500	<i>M. Boulton</i> - Virino ĉe la land-	» 1250
— Historio de la lingvo Espe-		limo (rilegato)	» 350
ranto, 2 volumi	» 900	<i>L. Tell</i> - La bela subtera mondo	» 1900
— Karlo, legolibro	» 250	La esperanta traduko de la Mal-	» 2250
<i>Lapenna</i> - Retoriko	» 1500	nova Testamento	» 2650
— Retoriko, rilegato	» 1850	<i>T. Sekeli</i> - Nepalo malfermas la	» 1150
— Aktualaj problemoj de la nun-		pardon	» 2150
tempa internacia vivo	» 1100	Esperanta Antologio	» 2500
— La internacia vivo - Faktoj		Esperanta Antologio (rilegata)	» 1150
pri Esperanto	» 1100	<i>G. Waringhien-Eseoj</i> - Beletro	» 2500
<i>Grosjean-Maupin</i> - Plena Vortaro	» 1900	— Lingvo kaj Vivo	» 200
<i>Angla antologio</i>	» 1700	— Lingvo kaj Vivo (rilegato)	» 200
<i>Zamenhof</i> - Originala Verkaro	» 1950	<i>Quarello</i> - Lernu Esperanton	» 200
— Fundamenta Krestomatio	» 1950	— Komplementoj de l' Substan-	» 200
<i>La ĵurso de Andreo Cseh'</i> rileg.	» 2600	tivo	» 200
<i>Premiaj romanetoj</i>	» 225	— Komplementoj de l' Verbo	» 200
<i>Baghy</i> - La verda koro	» 500		
<i>Solomon</i> - Esperanto por infanoj	» 250		
<i>G. Waringhien</i> - Grand diction-			
naire Esperanto-français, ril.	» 3100		
Leteroj de Zamenhof, 2 vol.	» 3200		
<i>Pacelli</i> - Manuale della lingua			
internazionale Esperanto	» 600		

Si aggiunga il 15% dell'importo per la spedizione, che viene sempre eseguita raccomandata. La F.E.I. fornisce inoltre qualsiasi libro delle edizioni U.E.A., S.A.T., Heroldo de Esperanto, Internacia Esperanto-Instituto, ecc.

## L'ESPERANTO - corso G. Galilei, 22 - Torino

Settembre-Dicembre, 1960 - Anno 38, n. 5 - Nuova Serie, n. 66

Spedizione in abbonamento postale - Gruppo IV